# Rekordoj de birdoj

Sur nia Tero vivas pli ol 8600 specioj de birdoj, ekde la plej malgranda ***kolibro*** ĝis la ***afrika struto***, kiu povas esti ĝis tri metrojn alta kaj pezi 150 kilogramojn. Eble pro tio ĝi ne sci-povas flugi. Tiom pli kuri. Facile ĝi atingas 50 kilometrojn hore (km/h). Ankaŭ aliaj birdoj ne sci-povas flugi – ekzemple ***pingveno***. Ankaŭ kuri ĝi povas nur malfacile. Sed en akvo estas alie. Pingvenoj havas rekordon pri subakviĝo. Iu el ili atingis profundon de 265 metroj. Ankaŭ en aero birdoj atingas rekordojn. Iuj specioj de ***nizoj*** atingas flug-alton de pli ol 11 km. Plej aĝa inter la birdoj, tre verŝajne, fariĝas ***kakatuo***. Ĝi povas vivi eĉ 100 jarojn. Pri ***strigoj***, ĉefe en fabeloj, oni diras, ke ili estas tre saĝaj. Plej verŝajne pro tio, ke ili havas ekster-ordinare grandajn okulojn, per kiuj ili povas bone vidi eĉ en mallumo.



Origino de la teksto: Juna Amiko, marto 2003
(kun iom da gramatikaj korektoj, kie ili vere-vere estis bezonataj)

Klarigoj :


- La lernantoj ricevas la malplenan tabelon.
- Ili aŭ desegnas la bildon de la koncerna birdo,
- aŭ elektas kaj gluas unu adekvatan el la multaj birdo-bildoj.
- Ili plenigas la kolumnon «Ĝia rekordo laŭ mi». (ĉi tie malĝusta respondo ne vere ekzistas, ĉar ĉiu povas havi sian propran opinion)
- La instruisto laŭtlegas 1-2 foje la tekston.
- La lernantoj provas noti kiel eble plej multe da rekordoj. (la ĝustaj respondoj troviĝas en la dua tabelo)
- Povas esti konkurseto, kiu trovis pli da veraj rekordoj. (malvera estas ekzemple ke la strigo estas tre saĝa, ja ĝi estas nur «onidiro»)

Rekordoj de birdoj

| ***Birdo*** | ***Birdo-bildo*** | ***Ĝia rekordo laŭ mi*** | ***Ĝia reala rekordo*** |
|---|---|---|---|
| kolibro | | | |
| afrika struto | | | |
| pingveno | | | |
| nizo | | | |
| kakatuo | | | |
| strigo | | | |


| | | | |
|---|---|---|---|
|  |  |  |  |
|  |  |  |  |











| *Birdo* | *Ĝia reala rekordo* |
|---|---|
| kolibro | La plej malgranda |
| afrika struto | 3 m-ojn alta, 150 kg, 50 km/h |
| pingveno | Subakviĝo je 265 m |
| nizo | Flug-alteco pli ol 11 km |
| kakatuo | Vivas ĝis 100 jaroj |
| strigo | Eksterordinare grandaj okuloj -><br>-> bone vidas ankaŭ en mallumo |